# *Vizitas Kubon la prezidento de Serbio, Tomislav Nikolic.*



Kun la celo plifirmigi la reciprokajn ligojn, la prezidento de Serbio, Tomislav Nikolic, plenumas oficialan laborviziton en Kubo, kie oni lin distingis per la ordeno José Martí, la plej alta distingo de la insulo, kaj renkonti?is  kun la prezidento Raúl Castro en la Palaco de la Revolucio en Havano.

Dum solena ceremonio oni elstarigis la historiajn rilatojn de amikeco ekzistantaj inter amba? landoj kaj la nuna batalo de la serbia popolo por konservi sian sendependecon.

La vizitanto oma?is la nacian heroon de la insulo, José Martí, deponante florbukedon anta? la monumento en la memorialo situanta en la Placo de la Revolucio.

Kiel parto de tiu ?i vizito, la unua farata de serbia prezidento al la kariba lando, Nikolic vizitis la Centron de Imunologio Molekula CIM, kiu de anta? 20 jaroj evoluigas grupon de terapioj kaj terape?tikaj strategioj por batali kontra? kancero  en Kubo kaj en la tuta mondo.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/56531-vizitas-kubon-la-prezidento-de-serbio-tomislav-nikolic

# Radio Habana Cuba